


BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.—SUP. DE «KATALUNA ESPERANTISTO».—AŬGUSTO 1913.—N^{ro} 6 (12)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Jozefo Grau. — *Projekto de unigrupigo*, Malgraŭ.



Sinjoroj Antonio Viñals kaj Bernabé Mira, grupanoj de «B. S.»,
en uniformo de tramistoj, kun la esperantista i signo

GRUPAJ AFEROJ

La komencon de la nova kurso ni reklamis per grandaj afiŝoj en la VII^a kvartalo de Barcelono. Ili bone efikis, ĉar multaj novaj lernantoj vizitas nian kurson, kiun gvidas S-ro. E. Pellicer, diplomita profesoro, helpate de F-ino. Cortés (mardojn kaj sabatojn 9^a-10^a vespere).

La Komitato decidis okazigi en la fino de la kursoj konkurson similan al tiu de la pasinta Marto, sed kun pli valoraj premioj, pri kiuj ni sciigos pli malfrue.

— Ni ricevis de la grupo de Valencio (koran dankon) tre luksajn afiŝojn

en Esperanto anoncantajn la jaran festaron en la bela urbo de l'floroj. Jen imitinda propagando.

— S-ro. J. Puig ekŝiĝis el la ofico de sekretario de nia Komitato. Lin anstataŭas provizore F-ino. Rosa Cortés. S-ro. A. Graells estis elektita de la Komitato por okupi la lokon vakantan pro ekŝiĝo de la ofico de voĉdonantino, kiun prezentis F-ino. L. Sánchez.

JOZEFO GRAU

PROJEKTO DE UNUGRUPIGO

La Komisiono por tiu projekto invitis la dekkvar efektive ekzistantajn grupojn en Barcelono al kunveno, kiu okazis en la sidejo de «B. S.» la 14^{an} de Aŭgusto. Ĉeestis reprezentantoj de naŭ grupoj, nome : S-roj. Renom, de *Ĉiam Antaŭen*; Tomás, de *Esperanta Racionala Grupo*; Agud, de *Esperanta Fratelo*; Pellicer, de *Barcelona Stelo*; Piñol, de *Supren!*; Muria, de *La Rondo*; Gili, de *Esperanta Fako del Centre A. de D. del C.*; Mateu, de *Esperanto kaj Patrujo* kaj Llorach, de *Espero Kataluna. Paco kaj Amo* sendis komunikon, promesante studi la laboron de la Komisiono.

Prezidis la kunsidon laŭ elekto de la ĉeestantoj, S-ro. Rev. La projekto publikigita en nia lasta BULTENO estis akceptita principe de ĉiuj reprezentantoj, krom de tiu de *Espero Kataluna*. S-roj. Piñol, Renom kaj Pellicer, nome de la grupoj, kiuj ilin delegis, plene akceptis la projekton. S-ro. Gili aliĝis ankaŭ al tiu akcepto, kun rimarkoj pri tio ke la grupo de li reprezentata estas fako de neesperantista asocio.

Ĉar kelkaj el la reprezentantoj ne havis plenan rajton decidi pri la afero, kaj ankaŭ ĉar kelkaj Komitatoj ne povis tute esplori la projekton, oni decidis kunvoki por la 6^a de Septembro novan kunsidon en la sama loko, petante la grupojn pri sendo de rajtigita delegito. La Komisiono esprimis sian deziron, kaj la kunsidantoj ĝin aprobis, ke la grupoj estu reprezentataj, en la venonta kunsido, de la tuta Komitato; tiamaniere oni pli efike povos labori.

Kelkaj ŝanĝojn oni proponis, kiuj pliperfektigas la prezentitan Regularon. Ili rilatas flankajn detalojn, kiujn tre bone zorgis la reprezentantoj de *Esperanta Racionala Grupo*, pretaj akcepti la Regularon, kiam la modifoj prezentitaj estos aprobitaj.

Resume : ni povas diri, ke certeco pri la sukceso de la entrepreno venis en la koron de ĉiuj ĉeestantoj. Ni esperas, ke post la venonta kunsido ni povos anonci, ke la *Barcelona Esperantista Societo* estas jam starigita.

MALGRAŬ